



Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Karaj gesamideanoj,

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Kodaj Nomoj

Gvidos: Fransoazo Oazo, Milan Kolka

Kodaj nomoj (angle Code Names, ĉeĥe Křycí jména) estas ĉeĥa tabla vortludo de Vlaada Chvátíl. La ludo estas monde populara, ĝi jam estis eldonita en 30 lingvoj, ne nur eŭropaj. Ĉar dum pandemio ne eblas ludi en ludklubejoj, eldonisto de la ludo lanĉis retan version de la ludo. Nia klubo tradukis la retejon kaj vortojn.

Ni trovis, ke en Fracujo estas esperantista grupo, kiu ludas Kodajn Nomojn rete. Ni estas feliĉaj, ke nia laboro estas utila kaj la ludo estas ludata. Feliĉe ni ankaŭ trovis, ke la francoj ludas en la sama tempo, kiam okazas renkontiĝo de nia klubo.

Tial tiu ĉi reta renkontiĝo estos vere internacia, ni kuniĝos al grupo de Fransoazo Oazo.

Detaloj pri tiu aranĝo vi vidos en evento de ĉeforganizanto:

<https://eventaservo.org/e/e1ba5a>

Ligilo al ZOOM-sesio: <https://us02web.zoom.us/j/9473053822?pwd=MzFwRmVEd29rN1FQdWdLa2JqeE5Mdz09>

Se vi ankoraŭ ne scias, kiel ludi la ludon, spektu registraĵon ĉe Jutubo: <https://youtu.be/yYi2IGC62zw>

Regulojn en la ĉeĥa vi povas legi ĉe <https://czechgames.com/files/rules/codenames-rules-cz.pdf>

Lingvo: Esperanto

Kiam: la 18-an de Januaro 2022 je la **17.30** h. (**atentu**, jam je la kvina kaj duono!)

Kie: La renkontiĝo okazos rete per programo Zoom

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

Mi sendos ligilon por la renkontiĝo per retroŝto marde.



Cetera programo en januaro

La 25-an **Dormo de racio en soveta biologio** – Oldřich Arnošt Fischer, Hybešova 65a

Programo en februaro

La 1-an **Verda Stacio** – Pavol Kaščák, rete per Skajpo

La 8-an **Kvindek jaroj de kolektado kaj fotado de senvertebruloj** – Oldřich Arnošt Fischer .
Občanský klub, Hybešova 65a

La 15-an **Ĉinio subjektive** – Petr Chrdle, rete per Skajpo
La 22-an **Membra kunveno / ĉlenská schůze** Hybešova 65a
Mi petas vin, ke vi proponu programon por marto kaj aprilo.



Ni rekomendas

- Vizitu **Arbaristan Panteonon**, belegan lokon tuj apud Brno. Reto de firmaj arbaristaj vojoj taŭgaj por promenoj, biciklado kaj promenoj kun infanĉaretoj, belegaj diversspeciaj arboj apude, monumentoj kaj akvofontoj (bedaŭrinde pro longa seko nur kelkaj kun akvo). Propagandisto te tiu ĉi regiono estas esperantisto Miroslav Hruška. La retejo estas ankaŭ esperantlingva. Se vi ĵus ne estas fermita hejme pro la ĉina malsano, iru eksteren kaj promenu en aŭtuna naturo. Faru ion por via sano. La regiono estas atingebla rekte el Brno per publika transporto.
- Komenco de Aprilo **Instruado de Esperanto Bartošovice**, Bartošovice (atentu, ne fine de Aprilo, kiel estas skribite en esperanto.cz. Ĝustan daton diris al mi la ĉeforganizanto, bedaŭrinde mi nun ne povas trovi mian noton)
- La 9-17-an de Julio, 2022 **56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj**, KLAIPĖDA, Litovio
- La 16-an – 18-an de Septembro 2022 **Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, Pardubice



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem [kanálu na Youtube](https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA) (<https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA>).

Náš program budeme nadále zveřejňovat na našem webu, Facebooku a na Eventa servu. Zejména Eventa servo považujeme za hlavní zdroj informací o esperantských akcích. Na webu esperanto.cz budeme zveřejňovat pouze celostátně významné akce (jako je třeba oslava výročí klubu) a on-line schůzky.

Milan Kolka
prezidanto